OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

# Sennaciulo

Sennaciulo, aprilo 2007, n° 4 (1222),MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442, prezo 5 €




Eltiraĵo el la skiztaglibro de la anarkiisto kaj esperantisto Jamaga Taiĵi, vidu p. 54

## Nia dosiero :

## Klasbatalo en kamparo



Junaj terkulturistoj kun ekologie produktitaj legomoj, vidu p. 51-53

www.satesperanto.org

# Klasbatalo en kamparo

Karaj legantoj kaj kunredaktontoj,

Ĉi-monate, la redaktoskipo prezentas al vi dosieron pri la bataloj de laboristoj en kamparo kaj arbaro. La enkonduka kovrilpaĝo prezentas foton, farita dum la intervjuo de Paz, kiun vi povas legi sur paĝoj 51-53, kaj bildon el la japana anarĥiista kalendaro, pri kiu pli detale rakontas Tonyo kaj Vinko sur paĝo 54.

Pri tiu temo ni havos la eblecon reparoli dum la SAT-Kongreso en Parizo, kie okazos, interalie, debato pri "semo-produktado kaj uzado". (Vidu la ceterajn en la prikongresa rubriko kaj tuj resendu vian aliĝilon, se ne jam farite).

Por la venontaj dosieroj, ni proponas la jenajn dosiertemojn (adaptotaj laŭ la ricevota materialo) :

**Agrikulturo, akvo kaj la estonto de la homaro.**


**Kia medicino ? : Kio pri la egaleco inter la popoloj ?**

**Prikultura dosiero : Popularaj kulturoj kaj la elitoj.**

**Socia ekonomio, egaleca komerco, liberaj programoj : perspektivoj kaj limoj.**

Tamen kontribuaĵoj pri aliaj temoj plu estas tre bonvenaj. Ankaŭ ne hezitu informi pri la agado de via loka SAT-rondo !

Agrablan legadon al vi kaj lavangon da kontribuoj al si deziras la redaktoskipo.



Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE S.A.T

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris,
tel. +33.1.47.97.87.05,
telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Free: 09.50.71.01.97
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la labor-horoj funkcias aŭtomata registrilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : **satx-s**

Redaktas: Redakta Komitato - Cyril Orsingher, Toño Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Pierre Lévy, Vinko Markov, Vito Markov, Nikolao Gudskov, Gary Mickle kaj Jacques Schram.
Ĉefredaktoro : Cyril Orsingher
Enpaĝigisto: Krešimir Barković
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

❒

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567

Limdato por ricevo de kontribuaĵoj

9 771163 044279



Intervjuo

# Trovi terkulturiston de la vivo

**Mi volas kune diskuti inter junaj terkulturistoj tutmonde pri rekta negoco de terproduktaĵo inter urbo kaj kamparo, pri egaleca komercado monde kaj enlande.**

**Mi kaj membroj de AKT (Agado Kontraŭ Tutmondiĝo ; angle Counter Globalization Action) havis ekskurson la 1an de marto 2007. Tiam mi intervjuis komencantan terkulturiston, s-ron YUN Seokhun. Li revenis al kamparo antaŭ 4 jaroj. Li estas ankaŭ ĉarpentisto. Antaŭ ol reveni al kamparo li laboris en Seulo pri komputila programo kaj presado.**

**Membroj de AKT interesiĝas pri produktado, cirkulado, konsumado de ekologiaj manĝaĵoj, kvankam tio progresas ankoraŭ malgrandskale. Ni malprecize eksciis pri terkulturo aĉetante terproduktaĵon de junaj terkulturistoj, kaj iom pli ni lernis terkulturon kultivante legomojn sur apud-doma kampo en Kjungi-Do Ĝanghung.**

**Rakonto de s-ro YUN komprenigis al ni malfacilecon kaj gravecon de kultivado de homaj manĝaĵoj. (Paz)**

**La loko "Dumulmori" situas proksimume 80 kilometrojn oriente de Seulo (aŭte 1 horon de Seulo). "Dumulmori" signifas : la renkontiĝa punkto de du riveroj (Suda Han Rivero kaj Norda Han Rivero). En "Du/mul/mori", "Du" estas du (same kiel en esperanto, mirinde !), "mul" estas akvo, "mori" estas kapo.**

**AKT estas organizaĵo por socia movado ĉefe pri kontraŭmilito-paco kaj ekologio-medio, kontraŭanta kapitalismon.**

---

*"Se vi volus vere realigi vian deziron, komencu tion ie ajn kie vi povas !"*

*YUN Seokhun* (37 jaraĝa, Terkulturisto en Kyunggi-Do Yangpyung-Gun Dumulmori)

---

**Inerta kemisterka kultivaĵo**

Paz : En ĉi loko, ekologia agrikulturo estas ĉefa. Kial estas tia ?

YUN : *Dumulmori* troviĝas apud *Paldang-lago*, kies akvo estas uzata kiel trinkakvo por civitanoj en *Seulo*. Do ĉi tie oni ne povas uzi terkulturan kemiaĵon. Tial ĉi tie loĝantoj ekskluzive provizas ekologia produktaĵon al la metropola regiono por vivteni sin kaj por la loka ekonomio. Sed nuntempe ankaŭ ekologia agrikulturo jam estas en konkura sistemo.

Paz : Ĉu ĉi tie oni tute ne uzas terkulturan kemiaĵon kaj kemian sterkon ?

YUN : Tute ne ! Terkulturada sindikato (Nome de "Vivigi vivaĵon en *Paldang*" decidis, ke oni ne uzu fosilian brulaĵon en forcejo. Ne nur terkulturan kemiaĵon sed ankaŭ kemian sterkon ni ne uzas, ĉar se ni uzus kemian sterkon, poste ni devus uzi terkulturan kemiaĵon. La kemisterka kultivaĵo estas senviva kaj facile moliĝas, do ne uzante terkulturan kemiaĵon, tio fuŝiĝos tuj.

Paz : Ĉu damaĝo de plantpesto kaj malutilaj insektoj ne estas granda ?